# TELOPEO

Oficiala Organo de La Esperanto-Federacio de Nova Sud-Kimrujo

*Volumo 50, Numero 10, Oktobro 2017*

**Esperanto Domo, 143 Lawson St, Redfern, Sydney NSW 2016, Aŭstralio**
**Redaktoro: Dmitry Lushnikov, Provleganto: Nicole Else**

## La Jarkunveno de EFNSK

Karaj membroj de EFNSK,

La Jarkunveno de EFNSK okazos la 12an de novembro 2017 je la 11-a matene. La estraro demisios kaj la postenoj estos atribuitaj dum la jarkunveno.

Bonvolu noti, ke pro la jarkunveno, ne okazos kunveno la unuan dimanĉon de novembro.

Ni esperas, ke vi povos ĉeesti la jarkunvenon, kaj bonvolu sciigi nin, ĉu vi deziras esti nomumata por la estraro aŭ povas iel helpi la Federacion.
Se vi NE povos ĉeesti sed tamen ŝatus voĉdoni, vi povas peti iun voĉdoni nome de vi (kiel via mandatulo). Bonvolu kontakti nin se vi ŝatus pli da informoj.

Ni ankaŭ feliĉus aŭdi viajn komentojn, ideojn, ktp, por la venonta jaro.

Amike,
Nicole Else
Sekretario, EFNSK

## Lingvaj Festivaloj

Waverley lingva festivalo okazis en la biblioteko de Waverley dimanĉe la 9-an de septembro.
Nia gasto el Adelajdo, Trevor Steele prezentis Esperanton, Richard Delamore prelegis pri la ĉina, Adam Levy komparis la hebrean kun la araba.
La Sidneja lingva festivalo okazos ĉe la Universitato de Sidnejo sabate la 9-an de decembro. Pli da informoj: www.LanguageFestival.org




## Membrokotizoj

Dankon al ĉiuj, kiuj jam remembriĝis. Se vi ankoraŭ forgesis, ne estas tro malfrue: Iru al esperantohouse.org.au/about-us/join
Ni akceptas pagon per kreditkarto, PayPal aŭ ĝiro.

EFNSW, Esperanto Domo,
143 Lawson St, Redfern 2016

EFNSW: Esperanto Domo, Unua Dimanĉo de la monato 11:00 ĝis 13:00
Por ĉiuj senpaga manĝeto, Esperanto Domo , Unua Dimanĉo de la monato 13:00 ĝis 15:00
Kontaktu Jonathan Cooper 0403 358 941

Manlia Esperanta Klubo ĉe Bavarian Beer Cafe, Manlia Kajo
1a kaj 3a Sabatoj; 10:00 atm; Komencantoj Bonvenaj
Kontaktu Roger (02) 9976 6320 *manly@esperanto.org.au*

La Meza Marborda Grupo; 3a Dimanĉo de la monato; kontaktu Joanne (02) 4362 8287
Novkastelanoj: Kontaktu Andrew (02) 4951 2084 *newcastle@esperanto.org.au*

La Suda Marborda Grupo; malgranda grupo kunvenas foje je Bega.
Komencantoj Bonvenaj. Paul Gorny (02) 9496 0395 Penny Vos (02) 6495 2922

Esperanto-Kafo-Klubo de Kanbero Jaŭde 17:00 la Pancake Parlour, 122 Alinga St.,Civic. Huigh 02 6288 4334 *huighm@gmail.com*

La Esperanto Federacio de Nova Sud-Kimrujo: Esperanto Domo,
143 Lawson St, Redfern 2016 (02) 9319 4775;
Malfermata ĉiun merkredon, 14:00 – 16:00
*(Sonigu elektran zumilon ĉe la strato)*
www.EsperantoHouse.org.au
retadreso: nsw@esperanto.org.au





| | |
|---|---|
| Prezidanto: | Jonathan Cooper |
| Vic-prezidanto: | Dmitry Lushnikov |
| Sekretario: | Nicole Else |
| Kasisto: | Alan Turvey |

Estraranoj: Richard Delamore, Andrew Spannenberg

# amikumu

Amikumu estas apo (poŝtelefona aplikaĵo), kiu helpos vin trovi kaj kontakti proksimajn esperantistojn – ĉiam, ĉie!




Esploru profilojn kaj esprimu vin

Trovu esperantistojn apud vi ĉiam, ĉie

Konatiĝu kaj renkontiĝu!

Elŝutu Amikumu
iPhone 4S aŭ iPad 2+:
Android (OS 4.0.3+):

La utileco de tia aplikaĵo por esperantistoj estas klara, iusence ĝi estas ĝisdatigo de la plej malnova servo de UEA, la Delegita Reto, kiu same celis plifaciligi kontaktojn inter homoj dum vojaĝoj aŭ pri komunaj interesoj.

– Mark Fettes, la Prezidanto de UEA

En Londono, mi trovis esperantiston apude per Amikumu kaj ni renkontiĝis tutsimple tiel. Mi apenaŭ povas atendi por uzi ĝin denove!

– Orlando Raola, Prezidanto de Esperanto-USA

## Por disvastigi Amikumu

Plusendu ĉi tiun flugfolion al ĉiuj konatoj per retpoŝto, fejsbuko kaj tvitero.

Plusendu ĉi tiun flugfolion al la organoj de via loka movado.

Printu ĉi tiun flugfolion kaj diskonigu ĝin ĉe via loka klubo.

Se vi volas kontakti la teamon de Amikumu pri gazetaj anoncoj aŭ demandoj, bonvolu retpoŝti nin ĉe

info@amikumu.com

amikumu.com

www.facebook.com/amikumuapp

La Oficiala Sponsoro de Amikumu estas la Universala Esperanto-Asocio